

Jaro IX. N-o 5-6.


MONATA

Majo-Junio 1926.

LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIIO ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŘSKÁ 333.

Jrabono (10 numeroj) Kč 20.—; fremdlando Kč 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pol-
lando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271



ESPERANTO-KONFERENCO EN LOCARNO

Aprilo 1926

FESTO DE SOKOLOJ

Laŭ H. J. esperante skribis O. Ginz, Praha.

Kio estis la Olimpiaj ludoj por la antikva Grekujo, estas la Festo de la Federacio Sokola*) por Ĉeĥoslovakio. La tuta nacio kunvenos dum la 4., 5. kaj 6. de julio nunjare, kiuj estos la ĉefaj tagoj de la festo, en la ĉefurbo por rigardi la admirindajn rezultojn, kiujn atingis la laboro de la Ĉeĥoslovaka Federacio Sokola, unu el la plej grandaj gimnastaj unuigoj en la mondo. El ĉiuj partoj de la terglobo alvenos Ĉeĥoslovakoj kaj eksterlandanoj al Praha kaj partoprenos en unu el la plej belaj imageblaj spektakloj de la fizika kaj morala forto. La nunjara VIIIa Festo de la Sokoloj estos pli grandioza ol estis iu antaŭa.

La Ĉeĥoslovaka Federacio de Sokoloj estis fondita en la jaro 1862 en la tempo de granda nacia subpremado, de Miroslav Tyrš (1832-1884), profesoro de estetiko kaj de artistorio en la universitato de Praha kaj de lia bopatro Jindřich Fügner. En la organizo ĝiaj kreantoj vidis modernan realigon de la antikva idealo de „kalokagathia“, de la belo kaj bono. Ĝi volis esti lernejo de fizika beleco, forto kaj fleksebleco kaj samtempe lernejo de disciplino, de volo kaj de patrujamo.

La komenco de la Federacio estis modesta, la unua Federacia Kongreso unuigis 2300 membrojn, el kiuj 720 partoprenis la publikajn ekzercojn. Nunjare anoncis sian aktivan partoprenon en la VIIIa Festo sume 127.215 Sokoloj, el kiuj 60.761 viroj kaj 31.279 virinoj, ceteraj estas gejunuloj.

La ciferoj ne surprizos, se oni scias, ke estas organizitaj en la Ĉeĥoslovaka Federacio de Sokoloj en 3151 lokaj grupoj 628.011 membroj, inter kiuj 246.082 estas viroj kaj 93.412 virinoj, 72.607 gejunuloj kaj 215.910 gelernantoj.

Pro la diverseco de la ekzercoj kaj pro la multnombra partoprenantaro estos necese okazigi la tutan programon dum kelkaj sinkvaj semajnoj. De la 6-a de junio ĝis 4-a de julio estas ĉiuj dimanĉoj rezervitaj por la festoj. La unuaj dimanĉoj juniaj estas dediĉitaj al malgrandaj sokoloj, lernantoj el la regiono de Praha. La Festo mem estos inaŭgurita 28-an de junio per grandaj ekzercoj de la junuloj, ĝiaj ĉefaj tagoj komencos la

4-an de julio. La tiam okazontaj grandaj kolektivaj ekzercoj estos sendube la plej bela parto de la programo el vidpunkto de la rigardanto. Estas vere senkompara vidaĵo rigardi 14.400 virojn kaj poste la saman nombron da virinoj fari en la grandega stadiono egalajn, graciajn kaj ritmajn movojn kun admirinda precizeco. La stranga siblanta tono de ĉi tiuj rapide moviĝantaj miloj da fortaj brakoj, la facilmoza svingado de la 14.000 elastaj virinaj korpoj kun la ŝanĝo de la koloroj blua, blanka kaj ruĝa laŭ la movo de la gimnastinoj, ĉio akompanata de gajaj tonoj de la muziko — estas vidaĵo vere unika. Aperos tie plej bonaj ĉeĥaj atletoj, anoj de la ĉeĥoslovaka armeo kaj Sokoloj de aliaj slavaj nacioj.

Por ebligi la nunjarajn grandiozajn ekzercojn, estis trovita nova loko por ili inter la reĝa kastelo Hradčany kaj la Blanka Monto, post la monaĥejo de Strahov. Tie la Sokoloj konstruis kun helpo de la registaro, kiu subvenciis la konstruadon per 11 milionoj da ĉeĥaj kronoj, novan grandan stadionon. La ĉefurbo Praha dediĉis 3¹/₂ milionojn da kronoj por konstruo de la akvokonduko, de elektra fluo kaj de specialaj tramlinioj al la stadiono. La stadiono okupos 320.000 kvadratajn metrojn kaj povos enteni 130.000 rigardantojn.

La organizo de la festo devenigis grandan vicon da teknikaj, ekonomiaj kaj financaj problemoj, el kiuj kelkaj estis tre malfacilaj.

Jam antaŭ multaj monatoj estis necese aranĝi metode la preparojn por la ekzercoj. La tasko de la personoj, kiuj instruis en la lokaj grupoj por la kolektivaj ekzercoj, ne estis facila, ĉar en la stadiono mem sole unu komuna provo povos okazi. Ĉiu gimnasto devas trairi severajn ekzamenojn, antaŭ ol li povos partopreni publikajn ekzercojn.

Ankaŭ konsiderindajn financajn oferojn postulas de la Sokoloj la aranĝo. Oni kalkulas, ke minimuma elspezo de ĉiu partoprenanto estos proksimume 330 ĉeĥoslovakaj kronoj (10 usonaj dolaroj), kiu sumo estas por laboristo sufiĉe alta, precipe se oni kalkulas, ke estas ofte kelkaj samfamilianoj Sokoloj.

Grandaj estas ankaŭ la problemoj de la transporto kaj de la loĝigo, kiuj devas esti solvitaj. Oni atendas dum la festaj tagoj alvenon de 600.000 personoj al Praha. Komitato konsistanta el 600 personoj zorgos, ke tiurilate estu ĉiuj deziroj plenumitaj.

*) Sokol — ĉeĥa vorto signifanta „falko“; tiel estis nomataj bravaj junuloj en la antikvaj heroaj kantoj de la slavo. La nomon akceptis la gimnasta unuigo en Ĉeĥoslovakio kaj en aliaj slavaj landoj.

Esperanto-
Konferenco
en Locarno



Internacia
Centra
Komitato

La Festo de la Federacio Sokola havas grandan signifon ne sole por la Sokoloj mem, sed ankaŭ por la tuta lando kaj nacio. Ĝi estos pruvo de viva forto de la ĉeĥoslovaka popolo, manifestado de pura idealismo, alta leciono de oferema spirito en servo de la tuto.

Ĉeĥoslovakio ĝoje atendas gastojn el la tutmondo.

EL ĈEĤOSLOVAKIO

Se iu tiuj ĉi koncizaj notoj speciale interesas iun el niaj eksterlandaj legantoj, la redakcio povas peri detalan informon.

Fervojan rabaton por bangastoj koncedis ministerio de ĉeĥoslovakaj fervojoj. Vizitanto restanta en iu ĉeĥoslovaka banloko almenaŭ 10 tagojn pagas por la revenbileto fervoja duonan prezon.

Ĉeĥoslovaka Ruĝo Kruco estas unu el la plej fortaj branĉoj eŭropaj de ĉi tiu internacia institucio. Ĝi posedas en la lando 644 lokajn grupojn kun 221.725 membroj, la junula sekcio 279.872 membrojn. La havaĵo de la societo valoras 13,000.000 Kč. Ĉeĥoslovaka Ruĝa Kruco preparis ĝis nun 15.000 personojn por helpa servo, ĝi havas 50 helpajn staciojn kun 26 aŭtomobiloj. Ĝi fondis kaj administras 164 tendarojn de junuloj, 109 malsanulejojn, resanigejojn, infangardenojn ktp. Por klarigo de siaj celoj kaj por ĝenerala eduko de la loĝantaro pri sana vivo aranĝis la Ĉ. R. K. 4.983 paroladojn, kiujn aŭskultis proksimume 1,500.000 personoj.

Nova radiostacio de sama tipo kiel London 2 L. O. estis malfermita en aprilo en Brno. En ĝia programo estas ankaŭ esperantokurso, la unua ĉeĥoslovaka radiokurso de esperanto.

Poŝtmarkoj ĉeĥoslovakaj por rilato kun eksterlando aperis 1-an de junio. Ĉiuj 3 valoroj (1-20, 1-50 kaj 2-50 Kč) havas la saman bildon de la ka-

stelo Karlštejn. Ankaŭ novaj poŝtkartoj por eksterlando simptaj kaj duoblaj (kun p-karto por respondo) estis eldonitaj. Al la nunjara Sokola festo aperis specialaj poŝtmarkoj po 50 hal., 1, 2 kaj 3 Kč kaj poŝtkartoj po 50 hal. La Sokolaj poŝtaĵoj estas vendataj kun 100 procenta alpago por celoj de la festo.

Ŝoseoj en Bohemio. Laŭ nombro de la ŝoseoj Bohemio estas sur tria loko inter la landoj eŭropaj havante meze 711 metrojn da vojoj sur 1 kvadrata kilometro. Sume estas en Bohemio 37.000 km da distriktoj kaj ŝtataj ŝoseoj.

Ĉeĥoslovakaj Sokoloj en Lyon venkis en la internacia gimnasta konkuro, gajninte la unuan lokon; la duan lokon akiris la sudslavoj. Post ili venis francoj kaj ĉiuj ceteraj nacioj.

Aera trafiko al ĉeĥoslovakaj banlokoj. La 1-an de junio estis malfermita la fluglinio inter Praha kaj Mariánské Lázně. Ĉiutage flugas aeroplanoj transportantaj pasaĝerojn kaj poŝtaĵojn el la ĉefurbo al la banloko kaj reen.

Agrikultura ekspozicio okazinta dum nunjara majo en Praha atingis grandan sukceson. Rilate la kvaliton de la objektoj tie montrataj kaj la grandecon de la okupita spaco, estas la ĵus fermita ekspozicio inter la unuaj ĝisnunaj. Estis tie videblaj la rezultoj de la bredado de diversa agrikultura bretaro, ĉevaloj, bovoj, porkoj, kortbirdoj kaj hundoj de plej bonaj specoj. La fama ĉeĥoslovaka industrio de agrikulturaj maŝinoj estis tie komplete reprezentita. Ĉies atenton meritis la zorge aranĝitaj ekspozicioj de specialaj fakoj, kulturado de lino estis tie montrata kun ĉiuj detaloj, same la promese evoluiganta ĉeĥoslovaka kulturado de silkraŭpo, la ŝtataj entreprenoj tabakaj montris tie prilaboradon de tabako. Granda aparta fako estis dediĉita al ekspozicio pri la nuna stato de la ĉeĥoslovakaj ŝoseoj kaj stratoj.

Esp. nálepky, 100 kusů, 13 různých druhů za 5 Kč. Obstará Vám Progreso.

RILATADO KUN HOMOJ

De Prentice Mulford.

Esti en rilatoj kun ĉagrenitaj aŭ nedecidemaj homoj, ofte kunveni kun homoj kole-raj aŭ facile ekkolereblaj, kun cinikuloj, kun skeptikuloj aŭ kun personoj havantaj malbonajn pensojn, malutilas la sanon. Se vi mem estas eĉ tute plena da fido, plej energia kaj plej kuraĝa, tamen eniĝos en vin el tiaj homoj iom da iliaj duboj, da ilia nedecidemo kaj da malkuraĝo kaj vi estos influata per tiuj ecoj. Via pensado estos kvazaŭ makulita. La malbonaj pensoj de aliaj estu de kiu ajn speco, ili infektos vin pli aŭ malpli.

Sed vi estos nek influata de la spirito de aliaj nek direktata aŭ kontrolata, se vi serioze deziras, ke vi ne estu tia. Klopodu per via spirito, liberiĝi de ĉio, kio povus malpliigi ĝian forton kaj vian feliĉon. Forto kaj feliĉo estas la samo. Forteco estas la kapablo forigi ĉion, kio vin ĉagrenas. Forteco estas la povo, per kiu vi povos konservi en via animo la senton de ĝojo kaj de feliĉo. Kiam vi foje gajnos ĉi tiun forton kaj vi estos la spiriton kaj la animon, ne permesante, ke la spirito regu vin, tiam la fizikaj okazintaĵoj de via vivo mem formiĝos kaj venos al vi akordiĝante kun via spirito.

La leĝo pri harmonio inter la aferoj de la materiala mondo kaj inter tiuj de la mondo spirita estas en sia efiko mirakle preciza. Homoj regataj de ĉagreno altiras malĝojajn okazintaĵojn. Homoj, ĉiam perdantaj fidon kaj malesperantaj, sukcesas neniam kaj ilia vivo estas sole peno por ili mem kaj por la aliaj.

Homoj kolerantaj estas grandaj pekuloj. Ili ekhavas inciteman spiriton, la kolero iĝos ilia firma kutimo, kiun venki estas ĉiam pli malfacile. La kolero ŝiras la korpon en pecojn kaj fine eĉ mortigas ĝin.

La forto de via korpo, la forto de via spirito, viaj sukcesoj en la entreprenoj, la plezuro, kiun via ĉeesto kaŭzas al aliaj, dependas de la speco de viaj pensoj. Ĉiu via penso estas parto de vi mem. Ĝi estas perceptata de aliaj kiel tia parto. Por esti agrabla kunulo, ne estas ĉiam necese paroli. La homoj, kiuj estas ĉirkaŭ vi, sentos viajn agrablajn pensojn, se vi havos tiajn. Ne estas ankaŭ necese, ke vi parolu, por iĝi malagraba al aliaj. Viaj malagrablaj pensoj estos ankaŭ sentataj de la homoj. La magnetismo de la homoj estas iliaj pensoj. La magnetita forto aŭ influo estas simple penso sentata de aliaj.

Se vi estas nedecidema, ĉagrenita, ĵaluza, mokema aŭ cinika, vi fortimigas la homojn. Ĝojo, espero, la sincera volo fari la plej bonon al ĉiu renkontato, eĉ por unusola minuto, tia spirito allogas.

Via valoro por aliaj dependas pli multe de tio, kion vi pensas ol kion vi parolas. Se vi pensas pure, klare, hele, konvinkite kaj kuraĝe, tiam vi signifas valoron, ĉiam kreskantan valoron, kien ajn vi iras. La homoj ĉiam ĝojos, vidante vin. Vi alportos al ili ĝojon kaj forton, vi fortigos ilin ankaŭ korpe. Ili sentos sin pli sanaj, kiam ili vin vidos. Vi estos fonto de sano kaj de plezuro, kie ajn vi aperos kaj vi malebligas eĉ la plej malbonan humoron kaj senarmigos viajn plej grandajn malamikojn.

Se vi povas diri al vi mem: Mi rifuzas konsideri iun homon mia malamiko — tiam vi ne havos malamikojn. Se ni parolas pri „niaj malamikoj“ kaj se ni daŭrigas en nia spirito iun konsideri nia malamiko, tiam ni faros el li malamikon, ĉar tiu homo ekkonos la specon de nia pensado. Ĝi estas elemento, kiu lin alfluas. Ĝi tuŝas lin malagrable. Sed se foriras de vi la pensoj: Mi ne estas via malamiko, mi ne volas havi pri vi malbonan opinion, mi volas vin pli ami ol mi tion faras — tiam li baldaŭ sentos tiujn pensojn. Li ne povos kontraŭstari ilian forton, ĉar la penso pri la bono estas ĉiam pli forta ol la penso pri la malbono. Tio estas natura leĝo.

Bonvolo utilas al via korpo. Ĝi faras vian sangon pli pura, viajn muskolojn pli fortaj kaj ankaŭ vian tutan eksterajn pli simetria en la formo. Ĝi estas la vera Eliksiro de la vivo.

Via povo ekkoni la karakteron de la homoj, dependas ĉiam de tio, ĉu vi estas plene libera de malbonaj pensoj.

Rilatu ĉefe tie, kie estas viaj spiritaj ecoj plej multe ŝatataj kaj bezonataj. Tiam vi bonfaros al vi mem kaj al viaj kunuloj spirite kaj fizike. Vi ne estos jungita en malsaman jugon. Vi povas restadi en societo de homoj, kiuj pliboniĝas per rilato kun vi, akceptante la veron, kiun vi donas al ili kaj klopodante agi kaj vivi laŭ ĝi. Ili estas viaj proksimaj spiritaj parencoj. Unu kvazaŭ konstruas en la koro de la alia, unu pliriĉigas la alian.

Elektis kaj tradukis el la angla E. B.

Koran dankon al la abonintoj!

BULTENO

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA, PRAHA-VII. SOCHAŔSKÁ 333

NUMERO 11—12.

MAJO—JUNIO 1926.

ĈU VI JAM ESTAS MEMBRO DE ĈAE?

Membro de Asocio povas kaj devas esti ĉiu ĉs. esperantisto, por ke li subtenu la propagandon en la tuta respubliko.

Kotizo: Membro *aktiva*: 16 Kĉ jare, Membro *subtenanta* 50 Kĉ jare, Membro *fonda* (dumviva) 500 Kĉ unufoje.

Membroj ricevas senpage *Bultenon* kaj, se ili pagis ta tutan kotizon per unu fojo, ankaŭ la membran premion:

Svaz národů o esperantu, ĉeĥlingva 48-paĝa broŝuro, kun riĉa propaganda materialo, (vendoprezo 5 Kĉ).

La malnovaj membroj, kiuj jam havas tiun ĉi premion, rajtas elekti inter la jenaj novaj premioj:

Jak byl rozluštěn problém jazyka mezinárodního, 48-paĝa broŝuro, kun riĉa materialo pri esperanto en komerco kaj turismo (3 Kĉ).

Devoj de la Homo, de Mazzini, 163-paĝa libreto, en esperanto; traduko de fame konata verko itala. (Valoro almenaŭ 6 Kĉ).

Al ĉiuj membroj estas donata *rabato 50%*, ĉe mendo de Ekzamena regularo. (Po 1 Kĉ anstataŭ 2 Kĉ).

Malpli riĉaj membroj povas pagi la kotizon 16 Kĉ en kvar partoj po 4 Kĉ.

Klubaj kasistoj! Enkasigante la kluban kotizon, enkasigu ankaŭ la asociajn 16 Kĉ!

Klubaj komitatoj! Akcentu en viaj kluboj la neceson de komuna kunagado kaj financa subtenado de la centro! Se en via klubo kelkaj personoj, pro sia malriĉeco, ne povas pagi, kial ĉiuj aliaj, povantaj pagi, ne faras tion, sed diras: Ĉe ni estas senlaboruloj, studentoj ktp., por kiuj la kotizo estas alta??

Asocio vin helpos, se vi volas fari propagandan paroladon kaj ne havas tekston por ĝi, nek propagandajn flugfoliojn.

Asocio vin helpos, se vi volas aranĝi propagandan ekspozicion kaj ne havas materialon por tio.

Asocio vin helpos, se vi volas fondi klubon kaj ne scias la formalajn, nek havas

ideon pri verkado de statutoj ktp.

Asocio vin helpos en ĉiuj aliaj okazoj!

Se vi mem ne ofte bezonas helpon de Asocio, memoru, ke estas multaj taskoj, kiujn nur Centro povas fari — kaj faras — sed ke por ĉiu ĝia laboro via membriĝo estas necesa!



KIEL ESTIS EN BRATISLAVA

Nia tria kongreso en Bratislava sendube restos en bona memoro de ĉiuj ĉeestintoj. Sur alia loko ni alportas la protokolon de la laboraj kunsidoj. Tie ĉi ni volus akcenti unue, ke ni multe devas danki al la aranĝintoj. Ĉie oni aŭdis ĝeneralan kontenton, plendoj preskaŭ ne estis. Iuj eble deziris, ke la stacidoma akceptejo estu en pli konvena ejo kaj ne tiom kaŝita, aliaj diris ke estis malmulte da entuziasmigo en la malferma kunsido, dum kiu oni ankaŭ tro parolis en diversaj naciaj lingvoj, kvankam al la neesperantistoj eble pli impresus flua esperanta diskutado. Sed tio estas aferoj, kiuj montras, ke nia publiko esperantista celas ĉiam pli kaj pli alten al perfekteco. Multon certe helpis ankaŭ la eksterordinare bela, serena vetero, veninta post pluvaj tagoj. En maja suno gaje flirtis flagoj sur hotelo, kie loĝis granda parto da kongresanoj kaj sur pluraj aliaj konstruaĵoj. La teatra prezentado plaĉis al ĉiuj ne nur pro elekto de vivoplenaj unuaktaĵoj, sed precipe pro bona aktorado. La promenado al la parko Petržalka ebligis interkonatiĝon de multaj. Nur la bedaŭrinda komisiono devis prepari laborojn, dume bela muziko logis al pensoj tute aliaj. La ŝipa ekskurso al ruino Děvín sur landlimo de tri ŝtatoj estis treege instrua kaj samtempe agrabla refreŝigo. Dimanĉe matene bela esperanta prediko de sam. Bartal kunvenigis rimarkindan nombron da pli aŭ malplikreduloj. Nur unu afero mankis, kiu ĉe multaj espistaj kunvenoj preskaŭ estas la ĉefa punkto: la fotografado. Domaĝe, tamen. Se la kongreso ankaŭ montrus sian influon al la kresko de la membroj de Centroj, ni povos esti kontentaj plene. Ĉi-okaze ankoraŭ unufoje: Dankon al vi, Bratislavanoj!

III. ĈS. KONGRESO EN BRATISLAVA

Salutoj

Salutaj leteroj aŭ telegramoj venis de la jenaj korporacioj aŭ personoj:

Filozofia Unuiĝo en Bratislava (. . . observas kun intereso la sukcesojn de la esperantista movado kaj vidante en esperanto signifoplenan rimedon por pliprosimigi la naciojn kaj per tio por disvolvo de la tuthomara kultura pensado, diras al via kongreso siajn simpatiojn kaj deziras al via traktado plenan sukceson. Por F. U. Dr. J. Marušiak, sekretario.)

Boh. Pluhař, landa inspektoro el Referát ministerstva školství (Slovakia fako de la ministerio de instruado): . . . bedaŭras ke li ne povas pro foresto el Bratislava ĉeesti kaj li ne dubas, ke la kongresa traktado estos nova paŝo en la vojo por fratego de la homaro.“

Internacia Centra Komitato de la Esperanto-movado en Genève.

Dr. Olšvanger, sekr. de *Cionista* monduiĝo en London

S-ino *Marta Root* el Warszawa en la nomo de la *Bahaa* movado.

Tutmonda Esperanto-Asocio *Junulara* el Leipzig.

Esperanto-Grupoj: Bucuresti (rumanaj esperantistaj organizaĵoj), Wien — unua unuiĝo, Děčín, Kladno, Kroměříž, Lanškroun, LLE Plzeň, Rondeto Praha, Ústí n/O. — Ĉeĥoslovaka Esperanto Servo en Praha. — S-ro Blum el Ĉúz je nomo de blinduloj.

Jul. Šupichová Praha, Berta Keyzlarová Červ. Kostelec, Vuk Echnert Praha, Nik. Licsko Terezín. Suchý Sliac, Bert. Gutmann Pyhanken, J. Sprušanský Komárno, M. Kovrč Helemba, Dr. P. Dolák Spišské Vlasy, Prof. Dr. Körper, red. de la revuo *Kultura* en Trnava.

Personaj salutoj.

Eksterlandanoj: Aŭstrio, Wien: S-ro Steiner; por ĉeĥaj samideanoj S-ro Ĉech.

El la respubliko: *Bratislava*: Wanitsek por Girlando, Fehér por Laborista Grupo; *Brno*: direktoro Bednář; *Čadca*: Popper; *Dvůr Králové*: F-ino Anjo Prihoda; *Holešov*: prof. Růžička; *Hradec Králové*: Sklenčka; *Jičín*: Sádek; *Košice*: Josef Friedrich; *Levice*: Bartha; *Liberec*: Michalek; *Olomouc*: Kudela; *Ostrava Moravská*: Dr. Parma; *Ostrava Slezská*: Kubala; *Pardubice*: Veverková; *Pezinok*: Diamant; *Plzeň*: Fencl; *Poprad Velká*: Eichmüller; *Praha*: Nyvltová; *Přerov*: Grauerová; *Sereď*: Kratochvíla; *Teplice Ražec*: Anderl; *Teplice-Šanov*: Ormos; *Trenčín*: Hofman; *Trutnov*: Dvořák; *Ústí n./Orl.*: David; *Vitkovice*: Hans Janik; *Zámky Nové*: Badin; *Zlín*: Rohrbeck.

Malferma kunsido

Sabate, 1. Majo, 10:30 h,

Spegula ĉambro de la Primata palaco

La prezidanto de la Loka kongresa Komitato, D-ro Stan. *Kamaryt*, malfermas la kongreson, kaj proponas elekti la kongresan estraron. Prezidanto: Rud. *Fridrich*, gimnazia direktoro el Brno; I. vicprez. G. Ing. *Scholze*, el Liberec; II. vicprez. dir. Rudolf *Spalek* el Bratislava. Ĝenerala sekretario kongresa Herold *Kesik*; Sekretarioj-protokolistoj: *Klapita* kaj prof. Vl. *Jukl*, ĉiuj tri lastaj el Bratislava. — Akceptita.

Por la neesperantista publiko, precipe por oficialaj reprezentantoj de diversaj aŭtoritatoj, sekvis nacilingvaj nelongaj paroladoj pri celoj kaj stato de esperanto-movado. Ĉeĥe parolis dir. *Fridrich*, germane Ing. *Scholze* kaj hungare dir. *Spalek*.

S-ro *Molec*, vicurbestro de Bratislava, salutas slovake, germane kaj hungare en la nomo de la urbo, kiu estas protektanto de la kongreso, kaj certigas pri ĉia helpo.

D-ro *Sipos*, advokato kaj membro de la urbestro salutas en esperanto.

D-ro *Kamaryt* slovake dankas al la reprezentantoj de la urbo, dirante, ke la ĝenerala mondoprogresado estas logike ligata kun esperantismo.

D-ro *Funk*, ĉefrabeno alparolas la kongreson hispane kaj germane. — S-ro *Benyovski* germane salutas la kongreson en la nomo de *Pressburger Zeitung*, la plej malnova loka gazeto.

S-ro *Kesik*, sekretario de la LKK, parolas pri la kongresa preparado, mencias neeblecon aranĝi la kongreson en 1925 en *Trenčianské Teplice* sekve de nesufiĉa intereso de slovakiaj esperantistoj, dankas por la helpo kaj multnombra aliĝo, petas pri indulgo, se io ne kontentigos.

Dir. *Fridrich* konstatas, ke la laboro de la LKK estis sukcesa; la ĉeestantoj aplaŭde konsentas.

D-ro *Kamaryt* proponas sendi saluttelegramon al la prezidanto de la respubliko: Třetí sjezd československých esperantistů pozdravuje svého jasného učitele. Předsednictvo sjezdu. — Konsento.

S-ro *Kesik* legas la alvenintajn skribajn kaj telegramajn salutojn. (Vidu aliloke.)

S-ro *Hromada*, ĝen. sekr. de ĈAE, prezentas koncize kelkajn punktojn laborajn: organizo en Slovakio, instruado en lernejoj, gazetara servo, radio kaj proponas, por plifaciligi la laboron, ke estu kreita komisiono, al kiu ĉiuj proponoj estu transdonitaj. La komisiono konsistu el membroj de LKK Dro *Kamaryt* kaj *Spalek*, el *Hromada* por ĈAE kaj Ing. *Scholze* por GEL. Krom ili ĉiu kongresano rajtas esti ĝia membro.

Sekvas salutoj de reprezentantoj de diversaj urboj (vidu aliloke) kaj je la 13 h. la prezidanto fermas la unuan kunsidon. La kongresanoj kantas la himnon.

II. kunsido

Sabate, 1. Majo, je la 19 h.

Spegula ĉambro.

Post la malfermo parolas S-ro *Hromada*, ĝen. sekr. de ĈAE: (koncize) Ekstera celo de niaj kongresoj estas propaganda kaj manifestacia. Tiun ni atingas uzante la okazon de la kongreso por plimultigi la priesperantajn artikolojn en la gazetaro kaj, vizitante multnombre la kongresojn. Tiu ĉi estas bone vizitata, sed certe estus pli multaj, se ni estus povintaj uzi la rabaton 25% konsentitan de la ministerio. Tio ne estis ebla, ĉar la ĉefa kondiĉo — aĉeti 1000 kontrolmarkojn po 1 Kč — ne estis plenumebla, se inter 200 kongresanoj sole 80-90 postulul la rabatilon. Por la venontaj kongresoj eble estus bone, ke oni sendu aliĝilon frutempe kaj notu sur ĝi, ĉu oni aliĝas senkondiĉe aŭ kondiĉe, ke estos rabato. Tiam la prepara komitato vidus, ke la rabaton aspiras ekz. 400 p. kaj sur tiu bazo oni povus kuraĝi la antaŭpagon de

1000 Kč por la kontrolmarkoj el la kongresa kaso. Tiam la rabato kostus al ĉiu persono sole 2-3 Kč. Tiun ĉi fojon multaj ne aliĝis atendante la rabaton kaj kiam ĝi ne estis donebla, ili restis trankvile hejme. Tamen la granda salono ĉi tie estas plena kaj videble la kongreso estas la plej bone vizitita el la ĝisnunaj.

Per sia grandeco la kongreso bone efikas en la urbo, tiom pli, ke la lokaj gazetoj jam longe antaŭ la kongreso publikigadis informojn pri ĝi, kelkaj eĉ longajn, kolonajn artikolojn. La germanajn gazetojn prizorgis S-ro R. Spalek, la slovakajn prof. Jukl kaj Dr. Kamaryt, kion ni danke mencias.

Interna celo de la kongreso estas ja kunveni por preparoli aktualaĵojn de nia movado, persone interkonatiĝi, intertrakti kaj solene ree deklari por la neesperantista publiko, precipe por la aŭtoritatoj, nian celon kaj dezirojn.

En tiu direkto la unua punkto estas, meti klarecon pri la organizaj principoj inter la slovakiaj esperantistoj, kaj akcenti ilin por ĉiuj esperantistoj de la tuta respubliko. Dum kvin jaroj kaj precipe post kiam Progreso aperas en Praha, ni akcentas, ke por nia movado validas la samaj principoj de koncentrigo de la fortoj, kiel por ĉiuj aliaj movadoj. Propaganda centro estas ja necesa por zorgi pri la entreprenoj de la tutlanda signifo, por kiu unu klubo loka estas tro malforta; estas necesa centra punkto, en kiu kolektiĝus la spertoj, la informoj, la dokumentoj el la tuta lando, por eliri el tie al la lokoj kie ili estas necesaj. La laboremaj kluboj kaj individuoj ofte estas en la situacio, kiam ili vidas nur solan helpon: turnis sin al ĈAE, petante parolanton, aŭ tekstojn de paroladoj aŭ de gazetaj artikoloj, konsilon pri klubo-fondo, materialon por propaganda ekspozicio, informojn por ekzamenoj pri esperanto, konsilojn pri aranĝado kaj gvidado de kursoj, propagandan materialon, flugfoliojn ktp. Tion konsciu ĉiu samideano: se li mem eble ne sentas bezonon de ia helpo el la centro, li pensu pri tio, ke lia kotizo, eĉ se ĝi ne alportas al li mem personan profiton, tamen helpas al la aliaj samideanoj, agemaj kaj propagandemaj. Ĉiu el ni devas sin senti parto de la tuto. Certe de tempo al tempo okazas, ke iu izolulo aŭ klubo havas ian sukceson sufiĉe gravan. Sed kiom pli multe povus tia laborulo atingi, se li akceptus helpon de la tuto, koncentritan en la Centro.

Kaj same naciaj centroj ne povas ekzisti sukcese per si mem, izolite. Ankaŭ ili kuniĝis kaj ilia internacia centro, la Sekretariejo de la Internacia Centra Komitato en Genève, estas por ili la kolektejo de la batala materialo. Tiu sento pri la bezono de la reciproka helpado kaj kunagado estas tiel forta, ke naciaj centroj kunvenis en Lorcarno por tie interkonsenti la necesajn detalojn. Ankaŭ ni sentas bezonon ricevi de ICK informojn dokumentitajn, utilajn por propagando, el la tuta mondo. Sed ĝuste pro tio ni sentas ankaŭ la devon liveri tiajn informojn el nia lando. Kaj por povi tion fari, la kunlaboro de ĉiuj kluboj kaj de ĉiuj unuopaj samideanoj en nia lando estas necesa. Tio estas klara al ĉiu pensanta homo.

Plie, se ion ni volas atingi antaŭ oficialaj rondoj de nia lando, niaj reprezentantoj devas paroli en la nomo de granda tuto. Ĝuste en la nuna tempo kaj precipe en nia lando tio estas kondiĉo, sen kiu ĉiu plua progreso estos tre malrapida. Tial: pripensu ĉion kaj ĉiu el vi aliĝu al centro: Ĉeĥo aŭ Slovako al ĈAE, germano al GEL. Koncerne

al la hungaraj samideanoj de nia lando, ili mem esprimis la deziron, trovi sian solvon dum tiu ĉi kongreso.

Inĝ. Scholze, prez. de GEL, parolante pri la neceseco organiziĝi, plene aliĝas al la vortoj diritaj de S-ro Hromada. Li donas kelkajn statistikajn datojn pri la organizo de germanlingvaj esperantistoj en ĈSR. Estis fonditaj tri laboraj distriktaj suborganizoj; tio montriĝis praktika, ĉar la Liga estraro estis malsarĝita, kaj ĝia laboro povis pliintensiĝi en gravaj aferoj. GEL reprenos la ideon de stacidomaj tabuloj, starigas kune kun ĈAE statistikon turrespublikan, ktp. Fine li invitas la 4an kongreson al nordbohemia banurbo Teplice-Šanov.

S-ro Kesik (Bratislava) parolas pri malfacilaĵoj, renkontitaj dum organizo de tiu ĉi kongreso. Nesufiĉa kompreno en pluraj grupoj. Cirkulerojn dissenditajn multaj ricevintoj ne respondas. Trovas necesa aliĝi al centro. En la nomo de la hungarlingvaj samideanoj li proponas kreon de unu tutŝtata centro, ne vidante necesa, ke esperantistoj estu dividitaj en ĈAE kaj GEL.

S-ro Badin (Nové Zámky) klarigas la malfacilan problemon de hungarlingvaj esperantistoj en ĈSR: Kien aliĝi, al ĈAE aŭ al GEL? Nenie ili ricevas ekz. sialingvajn propagandilojn. Li mencias proponon, ke ĈAE kreu hungaran sekcion. La kotizo 16 Kč li trovas tro alta.

S-ro Fridrich (Košice) trovas nerekomendinda la ideon de sekcioj. Tiam ekzistus unu ŝtata centro, kiu havus ĉeĥoslovakajn kaj germanajn sekciojn. Sed ĉu la hungaroj estas sufiĉe multaj por krei la trian sekcion? Ĉu estas eble ke ekz. la tekstoj por gazetara servo en La Progreso aperu diverslingve? Sed la organiza ordo estas urĝa. Ne plu parolu, sed agu! Tie ĉi donis ekzemplon la klubo de Košice, kiu akceptis decidon, ke ĉiu ĝia membro estu organizita en ĈAE aŭ GEL, laŭ sia elekto. Li deziras, ke la kongreso almenaŭ proklamu la devon, ke ĉiu grupano estu membro de nacia centro.

S-ro Schmidt (Nové Zámky): Ĉiu membro pagu al kluba kaso 20 Kč jare kaj estu membro de UEA.

S-ro Kesik demandas, al kiu aliĝu la klubo.

S-ro Friedrich (Košice): Al neniu. Niaj centroj organizas ĉiun esperantiston senpere, ne pere de klubo.

S-ro Svidt: Skizas la planon de organizo: monda, landa, loka. Tion malhelpas la financa flanko. Plej bona solvo estus: trovi unusolan kotizon, per kiu ĉiu estu membro de ĉiuj ĉi tri specoj organizaj.

Landa centro estu nur unu, kun neŭtrala nomo kaj kun naciaj sekcioj.

S-ro Kiss (Bratislava): La varbado por la centro faciligos, se ni kreas delegitojn, simile al UEA. Kunigo de ĈAE kaj GEL ŝajnas al li nesolvebla.

S-ro Friedrich (Košice): Varbado por centro sukcesas tie, kie la klubaj komitatoj mem zorgas pri tio. Tio eĉ estas ilia devo.

S-ro Hromada: Kelkaj parolintoj opinias neebla, ke hungaroj organiziĝu en ĈAE. Li konstatas, ke ĝuste el la grupo Nové Zámky ĈAE havas membrojn hungarlingvajn. Ni aperigas nun Oficialan Bultenon nur en esperanto, ĝuste pro tiaj ĉi alilingvaj membroj. Materialo por gazetara servo aperas en Progreso ĉeĥe, sed en pluraj lokoj de Slovakio oni ilin tradukas en la slovakajn kaj eĉ en la hungaran kaj publikigas en lokaj gazetoj.

D-ro Kamaryt rekomendas kalkuli kun realeco. Kotizo ĉiam devas esti sufiĉa. La kunveno de Nové Zámky ellaboris regularon por Slovaka sekcio

de ĈAE kaj ĈAE konsentas nomi sekretarion por Slovakio.

S-ro *Friedrich* (Košice) timas distrionigon de la organizaĵo. Sekretario estas sensignifa solvo. Li ripetas sian proponon: solene deklari devon esti organizita en la nunaj du centroj propagandaj.

S-ro *Mastný* (Olomouc) subtenas la proponon de *Friedrich* kaj rekomendas aparte noti membrojn el Slovakio, por krei ion specialan por ili, kiam ili estos almenaŭ 500.

S-ro *Kiss* (Bratislava) ne simpatias kun la ideo de sekretario slovakia, trovas la direktajn rilatojn kun la centro pli bonaj.

D-ro *Kamaryt* resumas la debaton, kiu ĝis nun montras tri opiniojn: kunfandiĝo de ĈAE kaj GEL en unu ŝtata asocio; nomigo de sekretario slovakia; kreo de slovakia sekcio de ĈAE. Li petas ke ĉiuj pripensu la aferon por povi morgaŭ atingi iu solvon.

S-ro *Hromada*: Ŝajnas, ke la ĝenerala tendenco de hungaraj samideanoj estas voĉdoni por kunfandiĝo de ĈAE kaj GEL. Li ne opinias, ke GEL akceptos tion. Pro tio li rekomendas trovi solvon, kiu kalkulas kun la ekzisto de la nunaj du naciaj asocioj. Al la duonlaŭta rimarko el la ĉeestantaro, li respondas, ke neniu povus ion riproĉi al la germanaj esperantistoj, se ili jam nun ne volus krei unusolan centron. Speciala politika pensmaniero de la germana neespe- antista publiko en la norda Bohemio montras al ili, ke nun estas pli sukcese propagandi el centro germanlingva. Li konstatas, ke la tuta problemo klarigis en tiu senco, ke sole hungaraj esperantistoj staras antaŭ la demando, kie organiziĝi. Sed ke por Ĉeĥoj kaj Slovakoj, vivantaj kie ajn en la respubliko, la devo estas klara: aliĝi al ĈAE. Same germanoj, vivantaj en Bohemio aŭ Moravio-Silezio aŭ Slovakio aliĝu al GEL. La tuta problemo simpligis en tiu senco, ke hungaraj esperantistoj devas interkonsiliĝi, kia solvo plej konvenus al ili. Li mem, por ĈAE, invitas ilin krei sekcion en ĈAE, kiel proponis kelkaj.

La kunveno estas fermita je la 20:45.

III. kunsido

Dimanĉe, la 2. Majo, je la 9:30

Spegula ĉambro

Dir. *Fridrich*, malfermante la kunsidon, petas ĉiujn paroli koncize, ĉar ankoraŭ aliaj temoj, krom la organiza, estas en la programo.

S-ro *Badin* deklaras en la nomo de la hungaraj samideanoj, kiuj interkonsiliĝis antaŭ la kunveno: Ni estas pretaj aliĝi al ĈAE sub la jenaj supozoj: 1. La nomo de ĈAE estu ŝanĝita al Ĉeĥoslovaklanda E. A., por ke jam la titolo montru, ke temas pri organizaĵo por la tuta ŝtato. — 2. Oficiala organo de ĈAE, La Progreso, havu tekstojn slovakajn kaj hungarajn. — 3. ĈAE zorgu pri hungarlingvaj propagandiloj kaj libroj. — 4. En la estaro la slovakiaj esperantistoj estu proporcie reprezentitaj. — 5. ĈAE zorgu, ke en Bratislava estu kreita ekzamena komisiono por slovakoj kaj hungaroj.

S-ro *Hromada* opinias pri tiuj ĉi punktoj jene: 1. Por ŝanĝo de la nomo estas, laŭleĝe, necesa la konsento de la membroj dum ĝenerala kunveno; verŝajne ni ne akceptus la teruran nomon „ĉeĥoslovaklanda“, sed internacian formon „ĉeĥoslovakia“; se tiu aldonu de unu, i“ venigos konsiderindan nombron de novaj membroj, la plejmulto da membroj verŝajne akceptus la ŝanĝon. Tamen, ni

lojale devos demandi GEL pri ĝia vidpunkto. — 2. Oficiala Bulteno en La Progreso jam nun aperas unulingve, en esperanto. Krom kelkaj esceptoj, en ĉeĥa lingvo aperas nur informoj por gazetara servo. Tiujn, kompreneble, slovakoj komprenas ankaŭ kaj tradukinte ilin slovake, metas ilin en slovakajn gazetojn. Por la hungaraj kunlaborantoj en la gazetara servo certe oni trovas ian kontentigan solvon. — 3. Certe ĈAE zorgus pri propagandaj bezonoj de hungaraj samideanoj, kompreneble proporcie kun la enspezotaj kotizoj. — 4. Memkomprenebla. — 5. Jam farita, ĉar la ministerio ĵus nomis esperantajn komisararojn en slovakaj kaj hungaraj ekzamena komisionoj.

S-ro *Svidt* demandas, ĉu GEL konsentus kun la aranĝo proponita de *Badin*.

S-ro *Scholze* deklaras, ke li ne povas pri tiu punkto paroli sen mandato de GEL, sed persone li opinias, ke GEL akceptus.

S-ro *Jukl* (Bratislava): La diskutado montras ĝeneralan konsenton pri la devo de ĉiu ĉs. esperantisto, esti organizita en ŝtata centro. Multaj deziras, ke estu sole unu tia centro, sen atento pri nacieco. Tio provizore montriĝas neebla, ni fortigu do la nunajn centrojn. Li proponas al la kongreso akcepti la jenan

Deziresprimon pri landa organizo:

Por pliproksimigi la ĉeĥoslovakian esperantistaron al la organiza idealo, la III. ĉeĥoslovaka kongreso denove akcentas, ke ĉiu esperantisto en ĈSR devas esti membro de unu el la propagandaj centroj. La kongreso solene deklaras, ke esperantisto estas por ni persono, kiu ne sole scias kaj uzas la lingvon esperanto, sed ankaŭ *helpas* al la plua progresado de nia afero per aktiva *kunlaborado*, aŭ almenaŭ per *materiala subteno*, estante membro de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista aŭ de Germana Ligo Esperantista.

Ĝis la tempo, kiam montriĝos ebla alia solvo, ekzemple ku fandiĝo de ĈAE kaj GEL, la hungarlingvaj esperantistoj en ĈSR aliĝu al ĈAE kun ŝanĝita nomo: Ĉeĥoslovakia Asocio Esperantista.

D-ro *Kamaryt*: La kongreso devas do elekti inter du solvoj; la nuna, laŭ kiu la hungaraj samideanoj aliĝu laŭvole al ĈAE aŭ al GEL, la alia (propono *Jukl-Badin*), laŭ kiu ili aliĝu al Ĉeĥoslovakia E-A.

Per voĉdonado la propono *Jukl* estas akceptita per ĉiuj voĉoj kontraŭ unu, el ĉirkaŭ 90 ĉeestantoj.

La prezidanto, Dir. *Fridrich* donas parolon al S-ro *Sklenčka*, ĉefdelegito de UEA por raportoj pri UEA-teritorio ĈSR.

S-ro *Sklenčka* en nelonga parolado akcentas la grandan praktikan valoron kaj la potencon moralan signifon de UEA. Li dankas al la membroj kaj delegitoj por ilia laboro kaj esprimas konvinkon, ke esperanto venkos per UEA.

Instruado de esperanto en lernejoj:

S-ro *Hromada* mencias du opiniojn: Laŭ la unua ni postulu de la ministerio la devigan instruadon de esperanto. (Propono de Esp. Societo en

Přerov). Laŭ la alia, ni ĉiam devas ja akcenti nian finan celon: deviga instruado, sed kalkulante kun la situacio, ni prefere plene eluzu la ĝisnunajn dekretojn pri nedeviga instruado, kaj petu, ke la lernejoj atortitoj ne insistu pri laŭlitera plenumado de certaj formalajoj, ekz. kondiĉo de 30 lernantoj, k. s. Plie, ni mem zorgu, ke kresku la nombro de state ekzamenitaj esperanto-instruistoj kaj ke ili efektive uzu sian diplomon en lernejoj de sia loko.

La kongreso aprobas ĉi vidpunkton kaj petas la Esperantistan Sekcion de la Centra Asocio de ĉs. Profesoroj redakti laŭ ĝi deziresprimon por la ministerio de instruado.

Esperanto en la telegrafio

La kongreso akceptas proponon de la komitato de ĈAE danki al la ministerio 1) por ĝia iniciato, sekve de kiu esperanto estis traktita dum Telegrafika konferenco en Parizo, 2) danki por la ĵus aperinta dekreto, laŭ kiu esperanto estas klara lingvo en ĈSR jam nun, depost la 15. Aprilo.

Esperanto en radio

La kongreso akceptas la proponon danki al Radio-journal en Brno por ĝia decido disaŭdigi esperanton, kaj peti la stacion en Praha pri la sama decido.

Esperanto en Foiro Praha

La kongreso danke konstatante, ke la Foiro Liberec-Reichenberg de pluraj jaroj uzas esperanton, atentigas pri tio la administrantojn de la Foiro Praha, rekomendante, ke almenaŭ esperanta reklamado de ĉi tiu estu daŭrigata.

Gazetoj

S-ro Hromada konstatas, ke granda nombro da gazetoj en nia lando, ĉeĥaj, slovakaj, germanaj kaj hungaraj, volonte publikigas informojn pri progresoj de esperanto. Kelkaj eĉ publikigas regulajn rubrikojn (Nový Lid, Moravsko-slezský dennik, Pressburger Zeitung kaj aliaj). La kongreso deziras, ke en ĝia nomo estu sendita danko al tiaj redakcioj.

La venonta kongreso

Prof. Murath (Teplice-Šanov) sciigas, ke la urbo Teplice-Šanov sendis oficialan inviton por la IV-a Samideanoj el Ostrava kaj Olomouc, kiuj preparis ankaŭ invitojn por siaj urboj, konsentas akcepti iun el la postaj jaroj. La invito al Teplice-Šanov estas akceptita.

S-ro Čech en la nomo de Wienaj ĉeestantoj dankas por la akcepto kaj invitas al la kongreso de Aŭstria esperantistoj en Graz.

S-ro Kiss parolas favore por abonado de Literatura Mondo.

S-ro Michalek dankas al la prepara komitato, precipe al D-ro Kamaryt, S-roj Kesik, Csáder, Spalek, kaj al ĉiuj, kiuj ilin helpis.

D-ro Kamaryt dankas pro laŭdoj, adiaŭas la gastojn kaj dankas al S-ro Fridrich por la gvidado de la kunvenoj, al S-roj Hromada, Schoze, Sklenčka por iliaj raportoj.

La prezidanto, S-ro Fridrich, resumas la laboron faritan, dankas al ĉiuj kaj fermas la kongreson je la 11:30 h.

Protokolis Prof. Vladimír Jukl kaj S-ro Julius Klapáta, ambaŭ el Bratislava,

Kongresanaro

Laŭ la tre detala raporto de la LKK aliĝis al la III. kongreso entute 239 personoj. Eksterlandanoj estis 17 (Budapest 3, Pécs 1, Wien 12, Melbourne 1), el la respubliko 222. Partoprenis la kongreson 211 samideanoj (17 plus 194).

Laŭ la landoj de ĈSR aliĝis 33 personoj el 18 lokoj de Bohemio, 44 personoj el 14 lokoj de Moravio-Silezio kaj 129 personoj el 18 lokoj de Slovakio (el Bratislava mem 82 personoj). Estas videble, ke Slovakio estis reprezentita kontentige.

Krom Bratislava, kiu kompreneble staras sur la unua loko, la plej multe da kongresanoj venis el Nové Zámky 13, el Praha 11, Pezinok ap. Bratislava 11, Přerov 10, Olomouc 10, Brno 7, Přívoz 4, Košice 4, Hradec Králové, Levice, Liberec po 3, Český Těšín, Holešov, Mor. Ostrava, Trenčín, Tornaľa, Ústí nad Orli., Žilina po 2. La plej orienta loko reprezentita estis Beregsás (Berehovo), la plej okcidenta Plzeň (germana grupo).

16 aliĝiloj estis plenigitaj tiamaniere, ke oni ne povis deĉifri la lokon. (!)

Financoj

La ambaŭ antaŭaj kongreson havis, kiel oni memoras, deficiton. En Brno pagis ĝin S-ro Barvř, en Liberec ĈAE kun GEL. La III. kongreso finis per profito de 580.18 Kč. Ni gratulas por tio al LKK kaj ĝia kasisio.

La kongresa konto montras jenajn enspezojn:

207 kotizoj po 15 Kč	3.105.—
15 kotizoj por familianoj po 10 Kč	150.—
17 kotizoj por eksterlandanoj po 5 Kč	85.—
Donacoj	498.—
Venditaj kongresaj ilustritaj p.-kartoĵoj	72.50
	entute
Elspezoj	3.795.77
Profito de la kongresa konto	114.73

Teatra konto enspezis 2253 Kč, elspezis 1769.55 Kč, kaj rezultigis do profiton de 483.45 Kč, kio atestas pri saĝa gvido de tiu ĉi teatra entrepreno.

